Ирина Саверьевна Алексеева ,

# Odo al Samarkando

*tradukita de Manfred Retzlaff*

*laŭvorta Esperantigo de la germanigo*

Mi kantas al vi, ho Samarkand'
Tiun ĉi kanton. Vi restis tiel juna.
Vi estas konata en la tuta mondo.
Kiu vin vidis, tiuj devas vin ami.

Profeto vin iam antaŭvidis
En sonĝo antaŭ longa, longa tempo,
Kaj Temerlan' vin konstruis
En via tuta majesteco.

Kaj viaj sanktaj haloj, trezorejo
De l' arto kaj de l' instruo,
Jarcentojn ili jam staras tie,
Kvazaŭ apenaŭ pasis tempo.

Tie ĉi la poeto Navoi
Estas kantinta pri amo kaj forto,
Kaj liaj kantoj ankoraŭ neniam
En tiu lando tute estas forsonintaj.

La kupoloj de la minaretoj tie ĉi,
Ili lumas tage kiel nokte la steloj.
Per la dekoro de iliaj ornamoj
Ili salutas ĉiun jam de fore.

Ho Samarkand, urbo de l' saĝeco!
Tie ĉi staras preĝejoj kaj moskeoj,
Kai tiu, kiu vin konas, tiu diras,
Ke en la mondo li vidis nenion pli belan.

Ho Samarkand, floru kaj prosperu!
Via gloro disfamiĝu ĉie,
Kaj eterne nepereema estu!
Ankaŭ estonte nin akompanu!

*Traduko de la Rusa poemo "Ода Самарканду" de Ирина Саверьевна Алексеева en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 2013-03-25.*

*Arg-860-1736 (2013-03-26 17:48:13)*